

& Faŝismo:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 280 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per sama melodio kiel por &Konfeso kaj nova rekantaĵo. Klarigoj (*): '3 Romia generalo Cezaro fame diris "Veni, vidi, viki" (Mi venis, mi vidis, mi venkis). '5 Liro, iama monunuo, italavro.>

(#Melodio:

<:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; La3La LaTi LaSo SoSo; SoSo SoSo LaSo do; do mire do dodo Ti La a)

)x8)+

(&Strofoj:

'1 /Ĉu heroojn li ĵaluzis ; De l' antikva glora Romo? ; Aŭ ĉu eble lin konfuzis ; Kaj allogis... glor-aromo?

(×; **Zorgojn li havas por gajno ; Dume eĉ ne pravas ŝajno ; Lia vanto hantas lin ; Zorgojn li havas por gajno.**)

'2 El "Hamleto" li parkere ; Citis al la tuta lando: ; "Estri aŭ neestri? vere, ; Tiel staras la demando!"

'3 Kaj li igis tuj afiŝi, ; Ke li ankaŭ, saman horon, ; Povis... "Veni, vidi, viŝi*... ; De la frunto venkan gloron!"

'4 Lian nomon jam admiras ; Kaj balbutas suĉinfanoj; Pli da famo li akiras ; Ol heroo de... romanoj!

'5 Ne rompiĝis lia Liro*, ; Ĝi firmiĝis post la falo, ; Tial ĝojas kun ekspiro ; Ĉiu bona kap-italo!

'6 Barkon de la ŝtat' prezidas ; De l' Ministro forta volo; Ĉiuj kantas! – Li nur gvidas; Estas lia... barka rolo!

'7 Kontraŭul' ne kontraŭstaras ; Al "frapantaj" argumentoj, ; Kiam lian vojon baras ; Kelkaj fortaj varb-agentoj;

'8 Lin konvinkas la ricina ; Boteleto, kajmi taksas, ; Ke eĉ viro plej obstina ; Tiam tuj kapitu...laksas!!